

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
117
somero 2019



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaŝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
25-a de septembro 2019**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

La studperiodo finiĝis preskaŭ samtempe kun la eŭropaj balotoj, kiuj estis granda surprizo por mi: en Le Beausset naŭ personoj voĉdonis por la Esperanta listo, kvankam niaj membroj ne loĝas en ĉi tiu urbo; tio estas pripensiga konstato, kiu ebligas esperi pri la sekvo! Efektive kaj bedaŭrinde, la federaciaj komitatanoj, dum sia ĵus okazinta kunsido, diskutis pri la fakto, ke nia federacio perdis plurajn membrojn kaj ke kelkaj kluboj ne plu kontentige funkcias. Urĝas tuj trovi solvojn por allogi novajn membrojn kaj por tio, ni kalkulas je la venontaj forumoj de asocioj, almenaŭ je tiu de Le Beausset, kie troviĝas naŭ personoj jam sciantaj, ke Esperanto ekzistas!

Pasigu agrablajn feriojn!

Pierre Oliva



enhavo

2	federacia agado	8	vojaĝemaj federacianoj
3	eŭropaj balotoj	11	pri Daniel Moirand
4	el la regionaj asocioj	12	agendo

Marc Chaminade

Ekzamensesio

La dudek-duan de junio okazis samtempe la unuagrada kaj duagrada ekzamenoj de FEI (Franca Esperanto-Instituto) en Le Beausset, kaj grandega aŭtovetkuro en Le Castellet, tute proksime.



Tial, la tri kandidatoj, Roselyne Favier, Christine Biancheri kaj Marc Chaminade, kaj ankaŭ la ekzamenantoj Renée Triolle kaj Pascal Vilain, timis malfrui.

Bonŝance ĉiuj facile kaj akurate atingis la ekzamenon « Maison des Frères » en Le Beausset, kie Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva aŭfable akceptis ilin.

La suno, la agrabla temperaturo, la kafo kaj la kukoj manĝitaj sub la altega pino fortigis ilin.

Tiam komenciĝis la ekzamenoj sen premado sed seriozege. Jen la gramatiko, jen la skribaĵo, jen la resumo kaj ankaŭ la parola parto cerbumigis la trapasantojn.

Finfine feliĉaj kaj fieraj, ĉiuj sukcesis.



de maldekstre dekstren:
Nicole, Christine, Pierre,
Roselyne, Marc, Renée



Marc Gallardo

Le projet "La Espero" que nous vous avons présenté précédemment a été annulé. Nous avons en effet appris que l'Orchestre Symphonique Officiel de Saint-Petersbourg venait d'enregistrer une nouvelle version de l'hymne espérantiste, sous la direction d'Igor Ponomarenko. Cette version, sous la forme d'un enregistrement de qualité professionnelle, sera jouée lors des cérémonies d'ouverture et de fermeture des congrès mondiaux d'espéranto organisés par UEA. Nous remercions tous ceux qui se sont impliqués dans le projet et l'ont soutenu financièrement ou de toute autre manière. Nous allons contacter chacun rapidement.

Renée Triolle

Tago de la eŭropaj lingvoj, la 26an de septembro

Okaze de tiu dato, mi proponas enketon en diversaj urboj (se esperantistoj pretas tion fari):

Viziti la butikojn aŭ restoraciojn kun angla nomo. Demandi ekz. :

Ĉu vi estas anglo?

Ĉu vi, viaj edz(in)o, kelnero, helpanto estas angloj?

Ĉu la nomo venigas anglojn aŭ usonanojn?

Kial vi elektis nomon en la angla?

Tio povus doni artikolon en la lokaj gazetoj, do okazo paroli pri la rolo de Esperanto.

Eŭropaj balotoj

rezultoj por Regiono SUD



oficiala kampanja afiŝo

departementoj	voĉoj	elcento
Alpes de Haute-Provence	81	0,12
Hautes-Alpes	66	0,11
Alpes-Maritimes	251	0,07
Bouches du-Rhône	461	0,07
Var	307	0,08
Vaucluse	187	0,09
sume	1 353	0,08

Kelkaj federaciaĵoj aktivis por konatigi la liston EDE okaze de la majaj eŭropaj balotoj. Jen ricevitaj raportoj kaj fotoj pri tio.

Gimnastiki kaj polui por Esperanto en la Eŭropa Parlamento

Renée Triolle

Okaze de la eŭropaj balotoj, iuj el ni pretis glui afiŝojn por EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto).

Tiel mi engaĝiĝis, gluis 140 afiŝojn en la departemento 13. Mi elektis unue mian urbon La Ciotat kaj la valon apud Aubagne (legantoj de la eldono "Aubagne" de la regiona gazeto "La Provence", kiu de tempo al tempo aperigas anoncojn aŭ raportojn pri la laboro de Esperanto-La Ciotat). Mi ankaŭ veturis al Aix kaj ĉirkaŭaĵo, ĝis Cavaillon, kaj alian tagon al la lago "Etang de Berre"; mi tiel veturis 950 km per aŭto tra nia regiono... kaj poluis. Plurfoje mi devis viziti la urbodomon por scii, kie ili afiŝas, aŭ ricevi konsilojn por afiŝi en la plej videblaj aŭ vizitotaj lokoj. Pro la granda nombro de kandidatoj, multaj urbestroj dividis la kutimajn panelojn, tiel ke iam ni havis la supran kaj mi devis "grandigi min" supren ĵetante la brakon, aŭ la mal-supran (tiam surgenuiĝi). Iuj paneloj estis nevideblaj: ricevas premion la biblioteko Méjanes en Aix: parkejo malantaŭ mureto, kaj nia afiŝo sube, malantaŭ platano! Mi decidis ŝpari paperon, eĉ se ĝi estus la plej bona loko informi pri Esperanto!

Venis la rezultoj: malfacilas konkludi kial venis 38

voĉoj en Tulono, 10 en La Valette, 23 en Arles... En Orgon, kie pasintfoje estis 30 voĉoj, ĉijare 0! Same en Châteauneuf-Le-Rouge, kie pasintjare ni havis brilan informtagon: eĉ ne unu voĉo! En la plej "afiŝitaj" lokoj estis 15 afiŝoj plus la nia; en kelkaj eĉ ne unu, ekzemple en Peypin (13), kie loĝantino deklaris: "Ili starigis la panelojn sur la ruĝan placon, kvazaŭ ili volus, ke ni ilin ne vidu", dum alia diris, ke tamen ĝi estas la plej ofte uzata parkejo en la vilaĝo.

Finiĝis la kampanjo, sed ne finiĝas nia laboro: plu informu pri Esperanto, reagu aŭtomate al ĉiu necesa uzo de la angla (nomo de vendejo aŭ restoracio, reklamo, "newsletter"), vizitu la lernejojn aŭ bibliotekojn kaj proponu senpagan liveron de "Le Monde de l'espéranto", agu en via sindikato ktp. Dankojn al ĉiuj, kiuj kiel mi gimnastikis: en Le Beausset, Saint-Raphaël, Nice, Lorgues, Draguignan, Les Arcs-sur-Argens, Le Muy, Vidauban (ne kompleta listo)...





afiŝoj
gluo
penikego
preteco
kuraĝo
entuziasmo

jen kelkaj
el la ingrediencoj
por sukcesa
elektokampanjo

ĉu ne,
Monique kaj Carmen,
Philippe kaj Jean-François ?



Eŭropaj balotoj: analizo de rezultoj por PACA kaj Francio

Gilles Wallez

Jen la rezultoj de Alpes-Maritimes: 251 voĉdonoj, t.e. 0.07 % de la esprimitaj voĉoj kaj 0,03 % el la en-skribitaj balotrajtuloj.

Por Var, 307 voĉoj, t.e. 0,08 % kaj por Bouches-du-Rhône 461 voĉdonoj, t.e. 0,07 %.

Je nacia nivelo, 18 587 voĉdonoj, t.e. 0.08 % de la esprimitaj voĉoj kaj 0.04 % de la registritaj balotrajtuloj.

(Komparcele, en 2014, je nacia nivelo, ni havis 33 115 voĉojn, t.e. 0,17 % de la balotintoj kaj 0.07 % de la registritaj balotrajtuloj.)

Bonvolu ankoraŭ noti, ke EDE tute ne estas la lasta el la partoprenintaj listoj: ĝi ja estas en la dudeka pozicio el 34 partioj; ĝi aparte situas antaŭ la federisma partio. Ŝajnas, ke la Briteliro prefere damaĝis por-eŭropajn partiojn kaj ne la invadon de la angla-usona... Plie Usono, tra tiu lingvo, estas en la fronto de la batalo kontraŭ Eŭropa Unio.

Ebla alia hipotezo pri la malpliigo de la nombro de

voĉdonoj por EDE estas, ke Esperantaj subtenantoj voĉdonis por la ekologiisma partio.

Do, nia malpliigo daŭras: ĉu ni devas malkuraĝiĝi? Laŭ mi, la malpliigo fine ĉesos, sed ni devos atendi kelkajn jarojn, eble unu aŭ du jardekojn; do nia nuna celo almenaŭ estu stabiligo.

Ni devus fari kritikan analizon de nia kampanjo:

Laŭ mi estas senutile esti agresema kontraŭ la invado de la angla lingvo, ĉar ni ne havas la necesajn fortojn por batali kontraŭ ĝi. Ĉi tio devus esti la rolo de aliaj ĉefaj lingvoj, kiel faras ekz. la kanadaj franclingvanoj, sed tio bedaŭrinde ne okazas en Francio.

Ni kontentiĝu publikigi nur la pozitivajn aspektojn de Esperanto.

Tamen ni ne devas forlasi ĉi tiujn eŭropajn balotojn, kiuj restas unu el la rimedoj por konatigi Esperanton pli malpli grandskale, eĉ sen voĉdonoj favoraj al ni.

En tiu tempo malfacila por ni, ni almenaŭ asertu, ke Esperanto daŭre vivas!

El la regionaj asocioj



13 - Espéranto - La Ciotat

Renée Triolle

Baŝkirio en nia regiono.

Nina Korĵenveskaja, el Ufa, gvidis kurson dum Mediteranea Esperanto-Semajno kaj restis kelkajn pluajn tagojn en nia regiono, kie ŝi havas amikojn ĉar ŝi estis asistantino pri rusa lingvo en la universitato de Aix-en-Provence.

Mercredi 27 Mars 2019
www.laprovence.com

ALLEZ-Y

La Russie aujourd'hui vue de la Provence

Si les capitales, Moscou et Saint-Petersbourg ont bien changé au cours des trente dernières années, qu'en est-il de la province ? Les régions excentrées profitent-elles de l'évolution ? Comment s'est fait le passage du socialisme à l'économie de marché ? Nina Korĵenveskaïa a été assistante à la faculté d'Aix-en-Provence, elle est retournée chez elle, à Ufa, au cœur de la République autonome de Bachkirie, entre Volga et Oural A 1500 km de Moscou, Oufa est considérée par l'institut Forbes comme la meilleure ville russe où faire du business. Ce soir à 19 heures au Grand Portique, 18 rue Vignol. Conférence en Français et/ou espéranto. Entrée libre et gratuite.

Ŝi faris du tre diversajn prelegojn, en Marseille pri la ŝanĝoj en la ĉiutaga provinca vivo de post la soveta periodo, dum la perestrojko kaj nun, kaj la duan kun fotoj en La Ciotat pri sia urbo.

Nun ĉio aĉeteblas se vi havas monon, ĉiuj havas poŝtelefonon sed terure mankas kultura vivo. La homoj ne plu legas, kompare kun la soveta periodo, kie en senvara vendejo, kasistino, atendante la klientojn, legis klasikajn francan aŭ rusan literaturojn!

Tikla momento estas, kiam oni parolas pri la dua mondmilito; laŭ ŝi mortis 50 milionoj da homoj (oni kutime diras, ke mortis 20, eĉ se jam temas pri grandigita nombro da viktimoj) kaj en Ufa oni ĵus konstruis novan monumenton al la soldatoj (pro respekto al niaj defendantoj). En Baŝkirion estis translokigitaj multaj uzinoj, multaj restas nun (aŭtomobila kaj aŭtobusa konstruejoj, ekz.).

Kun humuro, ŝi citas kutiman demandon de la francoj: "kie situas via vilaĝo?". Ufa estas ĉefurbo de Baŝkirio, kun 1,3 milionoj da loĝantoj; ĝi situas inter du "riveret-

oj", 300-metrojn larĝaj... kaj etendiĝas je 40 km.

Vintro daŭras 6 monatojn sed oras aŭtuno pro la arbaroj kaj multas verdaj parkoj en la urbo mem. Tie kunvivas pli ol 100 naciecoj, la baŝkiroj ne estas la plimulto (30%) sed sola regulo estas, ke la prezidento de la aŭtonoma respubliko estu mem baŝkiro.

Troviĝas ankaŭ tataroj (40%). Harmonie kunvivas ankaŭ islamo (72% de la loĝantaro, tamen ŝi parolas pri "ateistoj-islamanoj"), kaj kristanismo (25% estas ortodoksoj). Ne estas ekstremistoj kaj ŝi timas, ke iam alvenos milito pro avido al petrolo (la plej granda rezervejo de Rusio!). Amuze estas, ke kiam estis konstruita rusa teatro, baŝkiroj konstruis sian baŝkiran kaj ankaŭ la tataroj sian tataran. Eblas spekti naciajn spektaklojn, kun samtempa tradukado tra aŭskultiloj.

Plian fojon, ni konstatis, kiom sensciaj ni estas kiam temas pri Rusio, eĉ se francoj ĝenerale havas emon al tiu lando. Kiu sciis, ke la dancisto Nureev estis baŝkiro?

Eŭropa Festo en La Ciotat

Sabate la 11an de majo, la eŭropa asocio "Eurocircle" okazigis sian feston en la urba parko de La Ciotat, kun la helpo de Domo de asocioj kaj kuirfako de Lycée de la Méditerranée, kiu preparis belan kaj bongustan bufedon, ekologie prezentitan en ligna manĝilaro.

Blovegis, tiel ke ni instalas nur la strukturon de la tendo, kiu tamen detruigis. Forflugis afiŝoj, dokumentoj, eĉ tendoj! Mi sekve rezignis pri la preparita ludo pri la lingvoj en Eŭropa Unio. Ĉar la organizantoj metis en la demandaron por infanoj: "Vizitu la budon, kaj demandu kiel oni diras "Bonjour" en Esperanto, vizitis nin plurdeko da infanoj, do bona okazo informi ilin sed ĉefe la gepatrojn aŭ geavojn. Venis nur pozitivaj sintenoj, flanke ankaŭ de junaj staĝantoj el Grekio, Rumanio kaj Germanio.

Dankis nin la urba konsilantano pri eŭropaj aferoj, ekestis bona kontakto kun la nova prezidantino de Ĝemelaj Urboj.

Dankojn al Marc, Michel kaj Titouan.



"Découverte du monde : langues"

Sabato la 25a de majo estis dediĉita al "Découverte du monde : langues" en la mediateko Simone Veil de La Ciotat, kun matena "initiation à l'espéranto" por familia publiko ekde 10 jaroj, kaj posttagmeze, prelego pri "La traduction dans tous ses états".

Mi longe preparis tiun prezenton por infanoj, trovis ludojn, skribis panelojn ktp. kaj venis neniu, malgraŭ la 6 000 mesaĝoj senditaj de la biblioteko al siaj leg-

antoj, kaj reklamo rekte farita la antaŭan sabaton okaze de la Festo de Eŭropo. Ĉar mi estis surloke, mi tamen diskutis kun la du bibliotekistinoj.

Posttagmeze, Inès Oseki-Depre (profesoro pri tradukologio en la universitato de Aix, tradukistino, verkistino) prelegis antaŭ sia edzo, sia lernantino (kaj amikino veninta kun edzo kaj du gefiloj), sia amiko (Usonano, profesoro en Aix)... kaj mi !



Café linguistique mensuel

L'endroit a changé : il a lieu dorénavant le premier jeudi de chaque mois, à partir de 18 h, à la Brasserie Les Danaïdes, 4 square Stalingrad, 13001 Marseille.

But de ces rencontres mensuelles : vous donner l'opportunité d'écouter et de participer à une conversation en espéranto ou de vous informer sur l'espéranto.

Comment atteindre la Brasserie Les Danaïdes ?

> A pied : tout en haut de la Canebière, face à l'église des Réformés

> En métro : station Réformés - Canebière, sur la ligne 1

> En tram : station Réformés - Canebière, sur la ligne T2



Forum des Langues du Monde, Marseille la 19an de majo

Renée Triolle



Pro minacanta pluvo, la budojn oni instalas ene.

Sinprezentis regionaj francaj lingvoj: kataluna, okcitan, korsika, eŭska (ili eĉ konservis mian libron pri Eŭskaj proverboj en Esperanto); eŭropaj: portugala (el verda Kabo), bulgara (granda budo kun pluraj familioj kaj prezento de kostumoj kudritaj de infanoj), rumana (sola virino), itala (sicilia); araba el Egiptio,

klasika araba, berbera, armena kaj kurda kaj ankaŭ kreola el Reunio.

Nia budo staris apud la budo de tradukistoj, do ni povis diskuti kun ili. Aperis ankaŭ franca gestlingvo kaj brajla.

Vizitantoj estis ĉefe junuloj el la kvartalo, kiuj vizitis siajn geamikojn, aliaj deĵorantoj kaj kelkaj interesitoj. Nia budo havis grandan sukceson ĉe la manĝohoro, ĉar dank' al Rosy ne mankis specialaĵoj (olivkremo kaj diverstipaj kukoj).

Deĵoris Michel, Eric, Marc, Rosy, Thierry kaj mi.

Enprogramigita estis prelego, ĝin vizitis manpleno de "eksteruloj"; post prezento de la monda lingvo-situacio, ekestis diskuto pri la angla, ne supera ĉar necesa, sed ĉeesta ĉar la francoj donas nomon en la angla al sia butikoj, ĵurnalistoj konstante uzas anglajn esprimojn, same reklamistoj malgraŭ la franca leĝo Toubon.*

Eĉ se nur centoj da homoj venis, la dokumentoj kaj informiloj klare montris Esperanton inter la lingvoj, kaj estontaj eŭropaj balotoj donas bonan okazon prezenti la alternativan rolon de ne-nacia lingvo por plurlingva Eŭropo.



* La loi n° 94-665 du 4 août 1994 relative à l'emploi de la langue française, plus connue sous le nom de **loi Toubon**, du nom de Jacques Toubon, le ministre de la Culture de l'époque, est une loi française destinée à protéger le patrimoine linguistique français.

Elle vise trois objectifs principaux : l'enrichissement de la langue ; l'obligation d'utiliser la langue française ; la défense du français en tant que langue de la République (article 2 de la Constitution de 1958).

Elle vise alors à assurer la primauté de l'usage de termes francophones traditionnels face aux anglicismes. (source : Wikipedia)

Monique kaj Pierrot Prezioso

Pro malfavoraj veterkondiĉoj, ne povis okazi nia kutima maja pikniko en Le Dramont, marborde sur strando. Ni do decidis okazigi ĝin en nia hejmo. Venis Marika, Vinko, Carmen, Alain kaj Denise. Ni piknikis ĉetable, ĝoje babilis kaj eĉ aŭskultis Esperanton! Jes, vere... ĉar Vinko registris lecionon de Assimil-kurso sur USB-ŝlosilon. Kiel pasintjare, ni planis okazigi alian piknikon la 1an de septembro, samtempe kun la Forumo de asocioj en Fréjus, sed pro ebla manko de deĵorontoj, ni verŝajne ne havos budon ĉijare. Se tio estos, ankaŭ nia pikniko estos nuligita.

Pascal Vilain

Kiu pli kaj pli pesimistas, asertante, ke niaj federaciaj kluboj iom post iom velkos ĝis prognozebla malapero?

Mi? Ĉu vere? Eble jes...

Sed vidu la apudan bildon: ĉu ĝi ne mensogigas min?

23 samideanoj, kiuj kuniĝis dimanĉon la 30an de junio en Les Issambres por komuna tagmanĝo, lasta rendevuo antaŭ longa somerpaŭzo!

23 esperantistoj, do? Tamen ne...

23 esperantoparolantoj, eble? Ankaŭ ne...

Sed tamen rekorda nombro por nia federacio: 15 el la partoprenintoj uzas nian lingvon, ĉu entuziasme ĉu diletante, ĉu regule ĉu fojfoje, ĉu bonnivele ĉu balbute...

Mankas junuloj sur la foto... jes, tio estas nia delonga problemo. Se ni ne solvos ĝin, mia pesimismo bedaŭrinde praviĝos...

Tamen (ĉiam indas tameni, ĉu ne?), post la tagmanĝo okazis longa diskuto, tutesperanta, pri diversaj temoj. La ĉefa estis la baldaŭa foriro de Maggy kaj Philippe Combote al Reunio pro profesia (kaj ankaŭ plezura?) kialo. Multis la demandoj: kial, kie, kiom da tempo? La respondoj bone montris, ke la paro el Saint-Mandrier – ja ankoraŭ por kelkaj tagoj – detale preparis siajn transloĝiĝon kaj instaligiĝon sur tiu forega, kvankam francdepartementa, insulo.

Alia pritraktita temo estis la iel kriza situacio de nia movado (mi ja estis unu el la ĉeestantoj).

Fine, antaŭ ol disiĝi, ni amuziĝis (!?) per lingva-kultura ludo.

Jen ekzemplo:

Mi diras al vi: «La Lasta Loka Kolokvo en Aulnay-sous-Bois». Per sama nombro da vortoj analogaj, aŭ samsignifaj (sinonimaj), aŭ kontraŭsignifaj (antonimaj), vi divenu esprimon, titolon, frazparton... nepre konendan de ĉiu klera esperantisto. Vi certe jam trovis, ĉu ne? Se ne... serĉu plu... cerbumu... uzu vian sagacecon... kaj ripozigu viajn neŭronojn spektante la suban foton... post ĝi estas la respondo...



Vi verŝajne trovis. Jes, prave... la respondo estas: «La Unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer».

(Se tamen vi ne ĉion komprenis:

Lasta/Unua; Loka/Universala; Kolokvo/Kongreso; Aulnay-**Sous**-Bois/Boulogne-**Sur**-Mer).

Ne hezitu proponi al mi pliajn tiajn luderojn, por pliriĉigi mian ludon.

Pascal Vilain

Kial ĉi tiu rubrikitolo ? Ĉu kreigis nova klubo en Hyères ?

Ne, ankoraŭ ne, kaj verŝajne tio neniam okazos.

Sed en urbo kiu havas «Rue Zamenhof», «Impasse Zamenhof» kaj «Résidence Esperanto», en urbo, kie estis Esperanta asocio (jam en 1910!) kaj aktivaj samideanoj, en la epoko ekz. de Lucien Amat... estus plaĉe revivigi nian movadon.

Sed por tion fari, unua kondiĉo estas la ĉeesto de tieaj esperantistoj. Bone, kelkaj jam estas surloke: eta sed laborema grupeto ĵus transloĝiĝis al la urbo de la 8 000 palmuoj. Ja alvenis antaŭ nelonge amiko el Perigordo, al kiu aldoniĝis Mari-Roza kaj mi. Aliaj esperantistoj loĝas en Hyères, eble malpli aktivaj, eble tro maljunaj. (Mi konas almenaŭ tri el ili.) Aliaj troviĝas sufiĉe proksime, en la Tulona regiono.

Al ĉiuj, kion do proponi? Unuapaŝe povus esti monata lingva kafejo, kiel en Marsejlo. Ni prie pripensos, kaj esperas, ke la titolo «Espéranto-Hyères» ne estos efemera.



Vojaĝemaj federacioj

Vojaĝo tra Irano

Christian Castillon

Mi redaktis tiun raporton respondante al mia nova irana amiko, kiu intervjuis min pri niaj antaŭa imago, dumvojaĝa sento, kaj posta memoro pri Irano kaj Irananoj. Do, tiu raporto ne traktas pri la mirindaj vidindaĵoj, sed pri la nemalpli mirindaj vidinduloj.

Tiu vojaĝo estas mia unua vojaĝo al Irano, kaj kiel emerito; mi do prenis la maksimuman tempon akorditan per turista vizo (unu monaton).

1. Unue, kion mi sciis pri tiu lando antaŭ mia vojaĝo, tio estis nur tio kion diras niaj amaskomunikiloj pri ĝi. Por bone kompreni kion ili diras, oni devas scii kiel ili mem akiras la informojn.

La gazetaroj akiras la informojn el la novaĵagentejoj.

Tiuj agentejoj ne estas tiom multnombraj, kaj la plej grava estas la « Associated Press » fondita en 1846 en Novjorko. Tiu agentejo estas la plej rigardata el niaj amaskomunikiloj. Sciante pri la nuna situacio inter Usono kaj Irano, oni povas imagi kion rajtas diri tiu agentejo.

Mi do sciis ke tiu lando estas gvidata de registaro ne sendependa de relegio (kiu estas la Islama). Pro tio, kelkaj devigaj reguloj regas tie.

Malpermesitas:

- Havi alkoholon
- Vestiĝi per pantaloneto, mallonga robo aŭ jupo
- Esti nudbrusta
- Sin bani aŭ sportumi kun aliseksulo(j)

La virinoj devas:

- Kovri sian kapon per tuko
- Kaŝi siajn brakojn

- Vestiĝi per larĝaj vestaĵoj (kiuj kaŝas la postajojn) kaj ĝenerale per longa pantalono.

... Plie, ekde la fino de la dua mondmilito, la plej gravaj atakoj suferitaj en Francio, estas faritaj de kelkaj uloj sinnomataj muzulmanoj, kaj pro tio, oni facile miksas tiun vorton kun teroristoj.

2. La deziro viziti Iranon venis pro mia filo, kiu pasintjare trairis aŭte la tutan landon, vizitante multajn homojn. Mi ekkomprenis, ke eble oni ne diras al ni la tutan veron pri tiu lando. La vizitprojekto naskiĝis kiam mi aŭdis pri la 12a MezOrienta kaj NordAfrika (MONA) kunveno, kiu okazos en Kaŝano.

3. Kun mia edzino, ni alvenis en Teherano ĉe iu mirinda Esperanta familio, kiu neimageble gastigis nin. Ni restadis tie kelkajn tagojn, malkovrante tiun nekonatan urbegon kaj eĉ spertante neforgeseblan naskiĝfeston.

La lastan vesperon antaŭ la kunveno, alvenis kelkaj eksterlandanoj, kaj ni povis rimarki kiel pacience kaj afable respondis Irananoj al grumblemaj kaj senpaciencaj homoj.

4. La 12a MONA kunveno okazis en Kaŝano (250 km sude de Teherano) de la 28a ĝis la 31a de marto 2019: tiuj 4 tagoj estis plene kulturriĉigaj. La lastan vesperon, kaj parton de la nokto, ni spertis grandegan afablecon el laboristo de la hotelo, kiu helpis nin mirinde por aĉeti busbileton (por iri al Ispahano), kaj rezervi tie hotelon ne tro kostan, kaj ne tro mal-

proksime de la centro.

Li donis al ni multajn konsilojn. Tio estis nia unua profunda kontakto kun ne-Esperantisto. La komfortaj «VIP-busoj» estas pli rapidaj ol trajnoj, kaj pli sekuraj ol la aŭtoj, kaj ili estigas interesajn kontaktojn kun iranaj vojaĝantoj.



partoprenantoj en MONA Maria kaj Christian Castillon staras je la lasta vico

5. En Ispahano (220 km sude de Kashano - Kaŝano), ni daŭre sentis grandegan helpemon el multaj homoj. Kaj tie ni eksentis ke la homoj pli rimarkas nin ol en la antaŭaj vizititaj urboj, precipe min kun miaj blankaj haroj (ĉar la Irananoj estas preskaŭ ĉiuj nigrharaj).

Dum nia vojaĝo, ni malkovris la aplikaĵon «Snapp» kiu permesas al tiuj kiuj havas aŭton, uzi ĝin kiel taksion. Kompreneble tio malpli kostas ol taksio, sed tio kio plej plaĉis al ni, estis la rilatoj kun la ŝoforoj, kiujn ni ne havis pere de taksio. Ispahano estas, laŭ ni, unu el la plej belaj grandaj urboj.

6. Ni poste iris al Yazd (320 km oriente de Ispahano) kie Esperanta familo denove afablege gastigis nin. Ni rimarkis ankaŭ, ke kreskas nia nekutima aspekto el la loka loĝantara vidpunkto. Tiu urbo aspektas kiel granda tradicia vilaĝo kiu tre plaĉis al ni (precipe la malnovaj kvartaloj). Ni travivis laŭtvoĉan kverelon inter virinoj, pro la fakto ke junulino ne surmetis kaptukon. Surstrate, ni havis tie grandan oportunecon esti alvokitaj de francparolanta gvidisto, kiu donis al ni bonegajn konsilojn, kiujn ni kompreneble sekvis: unue, vidi la tradicion Iranan sporton en Yazd, kaj poste, kontakti Mansour, fakulon pri la dezerto en Kermano.

7. Kermano (400 km sud-oriente de Yazd): ni alvenis en tiu perdita urbo je la pordo de la Lut-dezerto. Plej malproksime de Teherano, malpli da turistoj, ni estis tie homoj pli rimarkeblaj ol en la aliaj urboj.

8. Kalut Shahdad (200 km oriente de Kermano, en la Lut-dezerto). Dum tiu ekskurso, ni povis rimarki ke Mansour estas tre respektata de multaj homoj, kaj ni komprenis, ke tio estas dank' al lia granda donacemo al la malriĉuloj.

9. Shirazo (570 km okcidente de Kermano): Reveno al verdaj teroj kaj pli da turistoj; ni havis la oportunecon rilati kun revoluciaj homoj pere de kiuj ni povis vidi malpermesitan filmon.

10. Antaŭ nia foriro, ni denove travivis fortajn momentojn en nia Irana familio, ni iomete malkovris la kurdan kulturon, kiu donis al ni la emon reveni por pli enprofundiĝi en tiun sentan riĉecon.

11. Post tiu vojaĝo, ni kompreneble pli bone konas Iranon kaj Irananojn, sed tiom malmulte. Ni tamen povas diri, ke ni neniam sentis agresemon, aŭ malsekurecon. Ni ne vidis kaj eĉ ne aŭdis pri iu terorista fakto dum nia monata restado. La ĝenerala sento estas iu granda internacia maljusteco pri la nuna situacio altrudita al tiu tiom afabla popolo.



Lut-dezerto

><><><

Bicikle tra Eŭropo

Alain Rémy, nelacigebla biciklanto, denove foriris la 2an de julio por vojaĝo tra Eŭropo: Italio, Slovenio, Hungario, Slovakio, Aŭstrio, Germanio, Nederlando, Belgio, Francio.

Li planas esti en Tulono komence de septembro.

Bonan vojaĝon, Alain!



En Dovro, kunvenis ne francoj kun britoj, sed homoj kun homoj...

Rosy Inaudi kaj Thierry Spanjaard

Ĉi-jare, la dunacia Esperanto-Kongreso de Francio kaj Britio okazis en Dovro (Britio), sed sufiĉe proksime de nia lando por ke, nokte, ni povis bone vidi la francan marbordon.

Provenco estis bone reprezentita en tiu kunkongreso. Ni ja estis 5 provencanoj (Marc, Chantal, Monique, Thierry, Rosy - *laŭ la vicigo de maldekstre dekstren sur la suba foto*), certe la plej multnombra regiona grupo krom tiu de Francilio.



Kiel en ĉiuj kongresoj, estis okazo por organizi ĝeneralajn kaj estrarajn kunvenojn. Espéranto-France organizis sian propran kaj nomumis novan prezidanton, Didier Loison, kaj novajn estraranojn.

Ni ĉeestis prelegojn pri gramatiko, fare de Bertilo Wennergren, la aŭtoro de la PMEG (Plena Manlibro de

Esperanta Gramatiko) kaj pri kelkaj diversaj temoj: familia vivo, la usona-hispana milito de la 19a jarcento kaj la Briteliro.

Inter la ĉirkaŭ tridek debatantoj pri la Briteliro, nur du voĉdonis por "foriri" okaze de la referendumo en 2016. Verŝajne la esperantistoj ne estas fidelaj reprezentantoj de la tuta brita socio. Tamen, dank' al la brita flegmo, la debato restis tute malakra.

La kongreso ankaŭ proponis ekskursojn: ni povis viziti la plej grandan kastelon de Britio kaj la famajn blankajn kretajn klifojn.

Tiu kongreso ankaŭ estis oportuneco malkovri kelkajn gravajn faktojn pri Britio:

- . La vetero en Britio ĉiam bonas, almenaŭ laŭ pruvo de kelkaj tagoj, kiujn ni pasigis en Dovro. Ĉiun tagon, ni vidis almenaŭ iom da blua ĉielo.

- . Dovro estas sufiĉe granda urbo, kiu enhavas du stratojn nomitajn "Green Lane" en du malproksimaj kvartaloj.

- . Ĉar nia "Green Lane" estis malproksima de la kongresejo, ni vokis plurajn taksiaŝoforojn, kaj ĉiuj estis ege afablaj, kiel cetere ĉiuj Dovranoj, kiujn ni renkontis.

- . Fiŝaĵoj kaj frititaj terpomoj ĉiam bongustas.

Ni varme dankas ĉiujn volontulojn, kiuj ankaŭ ebligis tiujn multajn momentojn de amikeco: matenmanĝoj, kafpaŭzoj, lunĉoj, manĝetoj, vespermanĝoj.

Ĉu Les Issambres estas en Belgio?

Maggy kaj Philippe Combet

Sub belega tute blua ĉielo (jes, vere, sennuba ĉielo!), en la bela lumo de la Norda Maro, ni trankvile promenis en Ostendo sur la senfina digo, kiu laŭiras la senfinan sablan plaĝon. Sur la maro navigis fiŝistaj ŝipetoj. Sur la sablo paŝis malmultaj homoj. Kaj sur la digo subite Maggy faris vastajn gestojn, por turni al si la atenton de virino, kiu kontraŭ ni promenis. Jen esperantistino!! Liliane!! Ŝi ne tuj rekonis la personon, kiu signis al ŝi. Jes, Maggy!! Saluton! Kion vi faras ĉi tie?

Sekvis amika konversacio kaj adiaŭa saluto, kaj ĉiu pluiris sian vojon.

Post kelka tempo, ni eniris kafejon por ĝui la tiel specialan Belgan etoson, kun odoro de vafloj kaj ĉokolado. Kaj, nekredeble, eniris ankaŭ Liliane en

hazarde la saman kafejon, kun amikino. Ŝi klarigis, ke tie estas ŝia kutima kafejo, kie ŝi tre ofte renkontas multajn konatulojn, kiuj, kiel ŝi, agrable pasigas siajn emeritajn tagojn en Ostendo.

Liliane proponis al ni la postan tagon veni al ŝia hejmo. Ŝi loĝas apud bela Japana ĝardeno, ne malproksime de la maro.



En sia apartamento, kie ŝi afable akceptis nin, meze de belaj pupoj el Indonezio, ŝi rakontis pri sia esperantista vivo, pri la Ostenda grupo kaj la konversacia rondo kun Germain Pirlot. Ŝi bedaŭris pri la staĝoj kaj renkontiĝoj, kiujn ŝi ne plu povas partopreni, pro malfacilaj veturrimedoj.

Kaj ŝi rakontis pri la lando Moresnet neŭtrala, kiu ekzistis, inter Belgio, Nederlando kaj Germanio, dum unu jarcento ĝis 1919, kaj en kiu oni proponis, ke Esperanto fariĝu la oficiala lingvo. Liliane donis al ni pri tio Esperantan libron, kies titolo estas Zinko (en Moresnet estis zinkominejo).

Tiel ni iom plu vivigis la amikan etoson, kiun Maggy kaj Liliane jam plurajn fojojn travivis en Les Issambres dum la Mediteranea Esperanto-Semajno.



En la printempa n° 116 de nia gazeto, vi legis pri la bedaŭrinda forpaso de Daniel Moirand, okazinta la 27an de marto. Mi tiam anoncis artikolon pri li aperontan en la somera gazeto. Jen ĝi. (n.d.l.r.)

Forlasis nin Daniel Moirand (1941-2019)

Profesia instruisto de la rusa lingvo en Lycée Mignet en Aix-en-Provence, Daniel ŝategis lingvojn.

Mi konatiĝis kun li en la universito de Aix, kie ni kune lernis la rusan. Li planis vojaĝon per Vespa al Hungario kaj, ĉar mi jam korespondis kun hungara esperantisto, Daniel petis, ke mia amiko traduku diversajn vojinformojn. Kiam li lernis Esperanton, mi vere ne sciis, sed lerninte la hungaran aŭ la turkan, li supozeble facile alproprigis al si la internacian lingvon.

Post la emeritiĝo de Michel Duc-Goninaz, Daniel transprenis la postenon en la Universitato de Aix por prepari studentojn al la Esperanto-ekzameno, ĉar tiam Esperanto estis unu el la eblaj fakoj por literatura licenco.

Li ne estis aparte movadema (kvankam li estis sekretario de la LKK por la kongreso de Esperanto-France en La Roque d'Anthéron), sed multe kontribuis al la Esperanto-vivo per partopreno al Esperanto-aranĝoj. Pluraj supozeble vidis lin ĉu en Katalunio, ĉu ĉe MES.

Li multe kontribuis al nia literaturo per verko de libro pri akuzativo "Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo" (eld.FEL 1990), kie li havigas amason da ekzemploj, kiujn li ĉerpis el tre diversaj lingvo-uzoj. Li verkis ankaŭ krimromanon "Murdo en Esperantujo" sed li ĉefe kontribuis per traduko de mejloŝtona franca romano "La Grafo de Monte-Kristo" en du volumoj kaj 1185 paĝoj (eld.FEL 2010) kun amaso da kromaj informoj pri la tiutempaj Marsejlo kaj regiono, ne parolante pri "La libro de la Mirindaĵoj aŭ la priskribo de la mondo" de Marko Polo, UEA 2001, volumo n° 34 de la serio Oriento-Okcidento, iniciatita de UNESKO. Pluraj supozeble aŭdis lin prelegi pri "La mil kaj unu noktoj", kiun li tradukis kaj bedaŭrinde ne sukcesis trovi eldoniston (ĝis nun).

Al lia edzino Josianne, kiu ankaŭ estas esperantistino, al liaj du gefiloj kaj nepino ni sincere kondolencas.

Renée Triolle



Sur Youtube, eblas spekti filmeton pri Daniel Moirand, kiu parolas pri sia esperanta traduko de "La mil kaj unu noktoj", okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno 2016 en Les Issambres. Vidu ĝin [ĉi tie](#).

Pro manko de loko, vi ne retrovis la kutimajn rubrikojn "ZEO-oj en Regiono SUD" kaj "Paĝo de la komencantoj".
Ili enestis (eble) la aŭtunan numeron 118.
Vi ankaŭ ne vidis la rubrikon "En la mesaĝkesto de la legantaro", kiu dependas nur de viaj mesaĝoj al la redaktoro.



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

Forums des associations

septembre 9 - Marseille

septembre 14 - La Ciotat

septembre 14/15 - Embrun

><><><

septembre 21 - Aix-en-Provence

promenade et pique-nique

(sera confirmé par message)

novembre 30 / décembre 1 - Le Beausset

Fin de semaine culturelle

(bulletin d'adhésion dans le n° d'octobre)

en France

Château de Grésillon - Baugé (49)

juillet 8-18 : 5èmes échanges de savoirs et de savoir-faire, 3ème cours d'espéranto marathon et nombreuses autres activités

août 6-16 : 2ème semaine internationale de danses trad et cours d'espéranto, 9ème semaine festive pour enfants, ados, jeunes, familles, grands-parents et nombreuses autres activités.

<http://gresillon.org/s4fr>

août 18-25 - Métabief (25) : Séjour dans le Jura, près de la frontière suisse. 3 niveaux de cours proposés, visites, concerts, conférences, jeux...

annemarieferrier@orange.fr

octobre 21-25 - Bouresse (86), Kvinpetalo.

Séminaire pédagogique avec Katalin Kováts.

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

en Europe

juillet 13-20 - Čačak (Serbie) : 52ème Congrès de la Ligue internationale des enseignants d'espéranto

infos : ilei.kongresoj@gmail.com

juillet 20-27 - Lahti (Finlande) : 104ème Congrès international d'UEA

infos : kongresoj@co.uea.org

août 4-11 - Barcelone (Espagne) :

92ème congrès de SAT


infos : <http://satesperanto.org/spip.php?rubrique631>

août 17 - à travers le monde : Univers parallèle : de 12h à 20h, simultanément en divers lieux, repas et rencontres de groupes espérantistes qui communiqueront pour échanger photos et films avec les autres participants.

paralela.universo@gmail.com

paralelauniverso.com

août 24-31 - Trieste (Italie) : 86ème Congrès italien d'espéranto - infos : kongreso2019.esperanto.it



GDPR (Ĝenerala Datuma Protekta Regulo de la Eŭropa Unio)

Espéranto-Provence kolektas viajn nomon, retadreson kaj poŝtadreson. Tiuj informoj estas uzitaj nur por la bezonoj de la asocio. Vi estas la posedanto de viaj personaj informoj. Vi rajtas aliri al viaj personaj informoj kolektitaj de ni. Vi rajtas ankaŭ peti forviŝon de la tuto aŭ de specifa parto.